

HOMARA BIBLIOTEKO

Praktika Esperanta Lernolibro

POR ĈIUJ LANDOJ

DE

Julio M. Rosenörn
Hispana Infanteria Kapitano



Eldonita de HOMARO
Hispana Monata Revuo

••••O••••

Tipografia.—Pasaje del Comercio, 8,
Madrid (España).

1914

Al mia kara amiko kaj samideano Ivo
Prinidold Lovicu mi dedikas tiun ĉi speci-
menon kiel elmontron de sincera amikeco.

Julio Moncada
Rosario

Madridon la 26^{an} IV^a 1914



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio
Rodríguez San Pedro 13 - 3^o - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (91) - 4468079

301
ROS
P. 18



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Avda. 2025 San Pedro 13 - 3^a - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (91) - 4468079

ANTAŬPAROLO

AL PROFESOROJ KAJ LERNANTOJ:

La praktiko dum tri kursoj konvinkis min, pri la plel taŭga kaj rapida metodo lerni kaj lernigi Esperanton, tiu metodo estas paroli de la unua momento esperanton, helpante la paroladon per mimika klarigado, objektoj, kaj desegnoj sur la tabulo, kvankam tiuj ĉi estos malbone farataj, nur uzante malmultajn precizajn naciajn vortojn kaj frazojn en okazoj, kiuj postulos ĝin, sed mi opinias, ke la profesoro ĉiam trafos celon per ĉirkaŭiro. Ekzemple:



Oni devas klarigi radikojn kaj finiĝon de l'vortoj. Oni desegnos kreskaĵojn kun ĝiaj radikoj, trunko, branĉoj, branĉetoj, folioj, floroj, kaj fruktoj, kaj per la desegno, klarigi partojn de l'kreskaĵo, ke iuj partoj ĉiam estas similaj (radikoj, trunko k. c.), ke aliaj, tiuj, per kiuj finiĝas la arbo estas kontraŭe malsimilaj (folioj, floroj, kaj fruktoj). Tiu klarigado oni faros per frazoj, demandoj, kaj respondoj: «tio-ĉi estas la trunko», «kio estas ĉi tio?», «ĉi tio estas la trunko» k. c. «Bone, trunko estas vorto», «kio estas trunko?», «trunko estas vorto». «Bone, atentu» (la profesoro, tion dirante, mimike akompanos vorton «atentu» montrante ke ili vidu kaj aŭdu). «Trunko estas radikoj de l'vorto trunko?» «O estas finiĝo de l'vorto trunko». «La radikoj ĉiam estas la sama». «La finiĝoj povas esti

2385

diversaj, kiel la finiĝoj de l'arbo.» (Oni faros pri tiuj frazoj demandojn kaj respondojn). K. t. p.


La profesoro legos laŭte je la komenco de l'klarigado lecionon, kaj la lernantoj mallaŭte, kaj poste, dum la farado de frazoj, li korektos ĉiam la elparoladon.

Mi forigis demandojn kaj respondojn, kiujn la profesoro povos fari, por malpligrandigi broŝureton, tial ke la unuaj lecionoj montras modelon.

La lernantoj lernos per ŝlosiloj, kaj parkere, regulojn, alfabeton, prefiksojn k. t. p. de la gramatiko, kiujn klarigos profesoro de tempo al tempo per la montrita maniero.

Mi finas dirante, ke tiu ĉi broŝureto estas korektita de nia lerta madruda kungrupano D-ro Rafaelo de San Millan, kaj tial, vere, ni ambaŭ estas la verkintoj.

J. M. Rosenörn



UNUA LECIONO

Mi salutas amikon

Mi iras tra la strato	Tra la dekstra trotuaro.	Ĉu, tra kiu strato kaj trotuaro mi iras?
Baldaŭ mi trovas amikon.	Kiun mi trovas?	Ĉu, mi salutas lin?
Mi kaj li haltas.	Mi prenas lian dekstran manon.	Kiuj haltas, kaj kion mi prenas?
Mi diras: «Kiel vi fartas?»	Li respondas: «Bone, kaj vi?»	Mi respondas: «Ankaŭ bone, dankon».
Ni interparolas iom.	Kiom da tempo ni interparolas?	Ĉu, ni interparolis multe da tempo?
De nove mi prenas amikon manon.	Kion mi de nove prenas?	Mi prenas amikan manon.
Mi adiaŭas lin.	Mi diras: «Fartu bone, ĝis revido».	Kion mi diras, kaj kiun mi adiaŭas?
Li ankaŭ diras: «Adiaŭ, fartu bone».	Kiel li repondas al mi?	Li respondas: «Adiaŭ, fartu bone».
Sed sela amiko fartas malbone.	Ĉu li estas malsana?	Jes, li estas malsana.
Tiam mi diras: «Kiel vi fartas?»	Li diras: «Mi fartas malbone, kaj vi?»	Mi respondas: «Mi nun bone».
Kiam ni adiaŭas nin reciproke.	Kion mi devas diri?	Kiel mi devas adiaŭi lin?
«Adiaŭ, resaniĝu baldaŭ».	Tion vi devas diri.	Tiel vi devas adiaŭi lin.
Poste mi daŭrigas mian promenadon.	Kion mi faras poste?	Postevi daŭrigas mian promenadon.
Li iris en kontraŭan direkton.	Ĉu, li iris Kontraŭen?	Jes, Sinjoro, li iris kontraŭen.

DUA LECIONO

Tempo

La tero ĉirkaŭiras la sunon.	Kiel oni nomas la tempon de ĉirkaŭiro?	Oni nomas jaron.
La jaro konsistas el dekdu monatoj.	Kio estas jaro, kaj el kio konsistas?	Ankaŭ konsistas el tricent ses dek kvin tagoj.
Oni nomas Januaro, Februaro, Marto, Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro kaj Decembro, la monatojn de la jaro.	Ses monatoj estas duonjaro, kaj tri monatoj estas kvaronjaro.	Ĉu, estas jaroj, kiuj havas pli da tricent ses dek kvin tagoj?

Kvar estas la sezonoj de l'jaro.

Printempo, somero, aŭtuno, vintro.

La tero turniĝas sur sia akso.

Ĝi turniĝas dum unu tago.

Monato konsistas el semajnoj.

Semajno konsistas el septagoj.

Lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato kaj dimanĉo estas la nomoj de l'tagoj.

Hodiaŭ estas mardo.

Antaŭhieraŭ estis dimanĉo.

La horo konsistas el sesdek minutoj.

El kiom da sezonoj konsistas la jaro?

Kiel oni nomas la sezonojn de l'jaro?

Ĉu, sur kio turniĝas la tero?

Ĉu, dum kion da tempo ĝi turniĝas?

Kio estas semajno?

El kio konsistas semajno?

Ĉu, vi scias la nomojn de l'tagoj, kaj se vi scias ilin, vi bonvolas diri ilin?

Hieraŭ estis lundo.

Postmorgaŭ estos ĵaŭdo.

La minuto konsistas el sesdek sekundoj.

El kvar sezonoj konsistas la jaro.

Printempo, somero, aŭtuno kaj vintro.

Ĝi turniĝas sur sia akso.

Dum unu tago, dum dudekkvar horoj.

Semajno estas parto de l'monato.

Semajno konsistas el septagoj.

Jes, sinjoro, mi diros ilin.

Morgaŭ estos merkredo.

Kiu tago estis la lasta de l'semajno?

TRIA LECIONO

La horloĝo

La horloĝo estas maŝino.

Kiel oni mezuras la tempon?

Estas turhorloĝo, poŝhorloĝo.

Risorto streĉita movas maŝineton.

La horloĝo havas blankan montracirkon, grandan kaj malgrandan montrilojn.

Oni dividas la bordon de l'montracirklo per ciferoj por la horoj kaj linietoj por la sekundoj.

La malgranda montrilo montras la horojn, la granda la minutojn.

Ĉu ankaŭ estas montracirklo kaj montrileto por la sekundoj?

La oka kaj dekdu minutoj.

Kvarono antaŭ la naŭa.

Kio esta la horloĝo?

Por kio taŭgas la horloĝo?

Ĉu, ne estas ankoraŭ aliaj?

Kial moviĝas horloĝmaŝino?

Kion havas la horloĝo?

Kial oni metas ciferojn kaj linietojn ĉe l'bordo de l'montracirklo?

Kion montras ĉiu montrilo?

Jes ankaŭ estas montracirklo kaj montrileto por la sekundoj.

Aŭ dekdu minutoj de la naŭa.

Dudekdu minutoj antaŭ la naŭa.

Per ĝi oni mezuras la tempon.

Ĉu estas diversaj horloĝoj?

Jes, ĉambrohorloĝo, vekhorloĝo.

Ĉar oni streĉas la risorton.

Kiel dividas la bordon de l'montracirklo?

Ĉar la ciferoj montras la horojn, kaj la linietoj montras la minutojn.

La malgranda montrilo montras la horojn, la granda la minutojn.

Kioma horo estas?

Duono de la naŭa.

Kvarono de la naŭa.

KVARA LECIONO

Mi deziras fumi

Mi eltiras tabakujon el mia poŝo.

Kion mi eltiras el mia poŝo?

El kie mi eltiras tabakujon?

Mi prenas la kovrilon.	Kial mi prenas la kovrilon?	Por malfermi la tabakujon.
Mi malfermas la tabakujon.	Mi eltiras el ĝi paperon kaj tabakon.	Kion mi eltiras el ĝi?
Unue mi detranĉas folion.	Por ĵeti en ĝin tabakon.	Kial mi unue detranĉas folion?
Poste mi fermas tabakujon.	Kiam mi fermas tabakujon?	Post kiam mi ĵetis tabakon sur folion.
Mi envolvas tabakon en la folio.	Por fari cigaredon.	Kion mi faras kaj kial mi faras ĝin?
Kiam mi envolvis tabakon, tiam mi trempas per la pinkto de l'ango bordon de l'folio.	Kiam kaj kial mi trempas bordon de l'folio, kaj kiel mi trempas ĝin?	Kiam mi envolvis tabakon por glui la bordon kaj eviti, ke la cigaredo malfariĝu, kaj per la lango salivtrempas bordon.
Mi faldas unu el ambaŭ ekstremaĵoj.	Kaj metas la alian intermijaj lipoj.	Kion mi faldas kaj kie mi metas cigaredon?
Mi prenas alumeton el la skatolo.	El kie mi prenas alumeton?	Mi prenas ĝin el skatolo.
Mi frotas flamiĝeman ekstremajon de l'alumeto.	Kaj ĝi ekbruliĝas.	Kion mi faras kaj kial?
La alumeto brulas.	Kaj mi ekbruligas cigaredon.	Kio brulas kaj kion mi ekbruligas?
Mi ekbruligas cigaredon ĉar mi alproksimigas brulantan alumeton al la pinkto de l'cigaredo.	Kiel mi ekbruligas cigaredon?	Kiel vi diris, sed oni devas suĉi la cigaredon.
Mi suĉas cigaredon.	Kaj la fumo eniras en mia buŝo.	Kaj mi enspiras la fumon.
Mi ĵetas alumeton en la plankon.	Mi elspiras la fumon.	

KVINA LECiONO

Mi skribas leteron

Mi skribos leteron aŭ poŝtkarton.	Ĉu mi skribos leteron aŭ poŝtkarton?	Mi skribos leteron anstataŭ poŝtkarto.
Mi povas skribi per inko aŭ kraĵono.	Per kio mi devas skribi?	Pli bone estas skribi per inko nigra.
Mi eltiras folion el paperujo.	Ĉu, mi ankaŭ eltiras koverton?	Kie mi metas paperon kaj koverton?
Vi metas paperon kaj koverton sur la skribtablon.	Ĉu mi trempas la plumon, kien, kaj kial mi trempas ĝin?	Jes, vi trempas ĝin en inkujon por povi skribi.
Mi komencas skribi.	Mi metas unue la daton.	Kion mi unue skribas?
La letero estas skribita.	Mi subskribas ĝin.	Ĉu mi subskribas ĝin?
Jes, per miaj antaŭnomo kaj nomo.	Kiel mi subskribas ĝin?	Per viaj antaŭnomo kaj nomo.
Poste mi faldas la leteron.	Kien mi enmetas ĝin?	Vi enmetas ĝin en la koverton.
Mi skribas adreson en la koverto.	Ĉu, mi povas meti ĝin en la poŝton?	Ne vi devas afranki ĝin.
Kien mi devas iri?	Vi devas iri en la poŝton.	Kaj tie afranki ĝin.
Ĉar nur tiel vojaĝas leteroj.	Kiel oni afrankas leterojn?	Oni afrankas ilin per poŝtmarkoj.

Mi metas la leteron jam afrankitan, mi jetas ĝin, en la poŝtkeston de l'poŝtoŝtifejo.

La letero alvenas al la adreso.

Ricevanto rompas la koverton.

Kiam vi metas afrankitan poŝtkarton, kaj kien?

Poŝtoŝtifejo portas ĝin en la adreson.

Li eltiras kaj malfaldas la leteron.

Mi jetas ĝin en la poŝtkeston de l'poŝtoŝtifejo.

Ricevanto pagas moneron al la poŝtoŝtifejo.

Li legas ĝin.

SESA LEClONO

Iri en la kafejon

Hodiaŭ estas festatago. Bone, mi iros kun vi.

Do, ni iros en kafejon.

Ni eniras kaj sidigas apud tablo.

Li demandas: «kion vi deziras?»

Li respondas: «mi nur trinkos».

Ne, mi volas pokalon da brando.

Li alproksimiĝas al ni.

Mi trinkos kafon kun lakto.

La kelnero revenas kunportante ĉion.

Ni interparolas pri diversaj aferoj.

Tamen loteriavendisto ĝenas nin.

Li foriras kaj alvenas jurnalvendisto.

La legado ĉagrenas nin.

Mi de nove vokas kelneron.

La kelnero faras la kalkulon.

Kial mi malpermesas ĝin?

Tial ni iros en la kafejon. Ĉu vi preferas iri en bierojn?

Ĉar tie ankaŭ servas bieron.

Ni vokas kelneron per manbato.

Mi demandas al mĵaj amikoj.

Mi trinkos nigran kafon.

Mi trinkos grandan glason da biero.

Li sidigas apud ni.

Tiam mi diras al la kelnero.

Miaj amikoj jetas sukeropecojn en glasojn.

Dum ni iom postiom trinkas.

Ĉar li obstine volas vendi bileton.

Li ekkrias: «Terura katasstro».

Trinkante ni komentarias la kaŭzojn.

Kiu alvenas, kiu alproksimiĝas al ni.

Miaj amikoj volas pagi.

Tial ke mi invitis ilin.

Ĉu, vi volas akompani min? Kiel vi deziras, por mi estas same.

Kaj mangaĵojn, kiel en restoracio.

La kelnero alkuras al ni.

Ĉu, vi trinkos kaj mangos?

Ĉu, vi volas pokalon da konjako?

Alia amiko alvenas.

Kaj mi demandas: Kion vi deziras?

«Bone, alportu ĉion kion ni deziras».

Por dolĉigi la trinkaĵojn.

Kaj muzikistaro amuzas nin.

Ni petas al li ĝentile foriri.

Ni aĉetas journalojn kaj legas ilin.

Kiujn ni multe bedaŭras.

«Faru la kalkulon»: mi diras.

Sed mi malpermesas ĝin.

Mi pagas, kaj donas trinkomon al la kelnero.

SEPA LEClONO

Iri en la teatron

Post kiam mi pagis al la kelnero.

Ni interkonsentas pri la teatro.

Ni eliris el la kafejo.

Alvenante ĉe la bileto vendejo, mi diras.

Kaj ni decidis iri en teatron.

Kiajn biletojn vi deziras?

Ĉu logion, apogseĝojn, amfiteatron?	Ĉu seĝojn de unua vico ĉe la unua etaĝo?	Ili preferas apogseĝojn de la unuaj vicoj.
Mi petas al la vendisto kvar biletojn.	Mi eltiras monujon, malfermas ĝin.	Mi eltiras monon kaj pagas ilin.
Mi prenas la biletojn kaj ĉiuj sekvas min.	Mi donas la biletojn al pordisto.	Kiu detranĉas parton de l'biletoj.
Ni ĉiuj eniras en la teatron.	Ni iras en la salonon.	Ni marŝas en niajn lokojn.
Ni okupas niajn apogseĝojn.	Ĉar montris ilin al ni lokiganto.	Ni demetas niajn surtutojn.
Ĉiu faldas kaj metas sian surtuton sur seĝdoron.	Ni sidigas kaj atendas oni levos rulkurtenon.	Kaj komencos la prezentadon.
La muzikistaro komencas ludi.	Oni aŭdas sonorojn de l'harpo.	Kian sonoron ni aŭdas?
Lahobojoj, trumpetoj, flutoj, violonoj, violonĉeloj, liutoj, liro, tamburo, piano, kaj aliaj instrumentoj miksas harmonie siajn sonorojn.	Kiuj muzikaj instrumentoj miksas siajn sonorojn, kaj kiel miksas ilin?	Tiuj instrumentoj miksas siajn sonorojn harmonie, kaj rezultas ĉarma valso.
Ĉu vi amas operon aŭ opereton?	Ni diskutas pri muzikaj motivoj.	Ĉu vi ŝatas aŭ preferas komedion?
Ne mi ŝatas tragedion.	Mi ne, nek dramon.	Mi preferas pli amuzigi, ol kortuŝigi.
Mi preferas pli ridi, ol plori.	Oni levas rulkurtenon.	Kaj aperas scenejo.
Ni vidas ridigteatraĵon.	Tre bone ludis ĝin aktoroj.	Kiuj estis tre bone karakterizitaj.
La kulisoj estas belaj.	Ankaŭ la scenentraĵoj.	La aktoroj ridigis nin multe.
Certe nia amiko estas prava.	Estas preferinde ridi ol plori.	Ni eliris gajaj, kontentaj el la teatro.

OKA LECIONO

Ekskurso al la marbordo

Ni projektigis vojaĝon.	Ni iros en la marbordon.	Ni devas kunveni ĉe la stacidomo.
Unuaj alvenas tie per tramo.	Aliaj per fiakro kaj omnibuso.	Ankaŭ per aŭtomobilo.
Ni eltiras niajn fervojobiletojn.	Enirante en la kajon.	Kune kun portistoj.
Kiuj portas valizojn kaj pakajojn.	Ni supreniras en la vagonon.	Kaj okupas fakon el ĝi.
Kie la portistoj metas valizojn.	Kaj ankaŭ la pakajojn.	Ni pagas al la portistoj.
Oni aŭdas fajflon.	Fajflon de l'estro de l'vagonaro.	Tuj ankaŭ oni aŭdas sonorilon.
Kiun sonorigas fervojoblicisto.	Subite ankaŭ longan fajfadon.	Longan fajfadon de l'lokomotivo.
Kaj samtempe bruon.	Kiun produktas eliro de l'vaporo.	Kaj la vagonaro ekmarŝas.
Baldaŭ ni trairas kamparon.	La fervojo estas bela.	Ĝi trairas laŭlonge valon.
Kiu mirigas nin pro sia beleco.	Ĝi estas belega kaj grandega parko.	Kun vasta kaj verda taĝo.

Vilaĝoj, urbetoj, industriejoj, kiu ravas nin. Ĝi disdonas siajn akvojn, movante ĝiajn maŝinojn, La fervojo supreniras la deklivon, riveron, kiel arĝentan rampaĵon. kaj, ĉe l'pinktoj eternajn neĝojn. pro proksimeco de l'neĝoj. kiuj devenas de fanditaj neĝoj. Ni alvenas tunelon. Ni pretiĝas nin vespermanĝi.	arbaroj, ĝardenoj kun horteloj, Ĉarma kaj trankvila rivero. per multaj kanaloj, kaj ankaŭ ili surverŝas kamparon. kiel vera serpento. Supren ni rigardas densajn Ju pli ni supreniras, Ni rigardas grandan akvofalon La suno jam subiras. Ni pasas sub la monto,	nuancas tiun tapiŝon, kuras tra la valo. kies akvoj nutras industriejojn, Ni alvenas ĉe la piedo de altega monto. Suben ni vidas belan valon, arbarojn de pinoj kaj kverkoj, des pli ni sentas malvarmon formita el akvoj Rapide noktigas. kaj ni transiras en alian kruaĵon.
---	---	--

NAŬA LECIONO

Vespermanĝo en la restoracia vagono

Ni iras en restoracian vagonon. Sur la tablo estas teleroj, bulkoj kaj boteloj da akvo, Buljono aŭ supo. Suko de rizo. de pizo. de fabo. de fazeolo. de lento.	Ni sidigas apud tablo tranĉiloj, forkoj, kuleroj, salujo kaj listo de manĝaĵoj. Jen la listo: <i>Fiŝoj.</i> Sardeloj frititaj Gado kuirita. Salmo rostita. Truto rostita. Ovaĵoj.	kovrita per pura tablutko pokaloj, glasoj, buŝtukoj. Ni legas la liston, menuon. <i>Viendoj.</i> Rostaĵo de bovino. Stufaĵo de ŝafido. Rostita lumbajo de bovino Fritita kotleto de porko. Bisteko kun terpomoj.
---	---	--

Ŝinko. Kolbaso. Rapoj. Olivoj. Bulboj. Butero.

Salatoj de
Laktuko, cikorio, kaj celerio.

Desertoj:

Diversaj fromaĝoj. Migdaloj. Piroj. Ĉerizoj. Prunoj. Pomoj. Figoj. Persikoj. Abrikotoj. Diversaj vinoj, kaj biero. Ni povas elekti. Ĉiu elektas siajn porciojn, kaj ni revenas al nia fako. Eltirante lanan vojaĝŝirmilon. kaj ni deziras ripozi, Iu ronkas, aliaj certe sonĝas.	Konjako, rumo, brando. Tial mi demandas vinojn k. t. p. Tuj ni pretiĝas nin dormi. Ĉiu ŝirmas sin per ĝi, kiel eble plej bone.	Kafo kaj teo. al miaj amikoj kion ili ŝatas. Ni verpermanĝas tre bone, Ĉiu malenvolas sian pakajojn ĉar la nokto estas malvarma, Baldaŭ miaj amikoj dormas.
--	--	--

DEKA LECIONO

La reviziisto vekas nin.

La reviziisto vekas min.
kiun li inspektas,
de nia vojaĝo.

Ni malsupreniras el la va-
gono.

Alia aŭtomobilo enkon-
dukas
atendas nin la mastro.

kaj servisto montras ĉambr-
ojn,
kun balkonoj ĉe la ĉefa fas-
ado.

Ni trovas ĉe ĉiu ĉambro:
kaj lavvazo, spegulon,

kaj puraj litukoj, kurtenojn,
la elektraj lampoj metitaj
kun ses etaĝoj krom sub-
tegmento.

Ni vizitas la hotelon.
kaj ni rigardas, bone aranĝ-
itajn,

patojn, korbojn, sitelojn, pot-
ojn,
kamentuboj estas feraj kaj
brilantaj.

Frapante mian ŝultron,
kaj traboras,
Baldaŭ ni eniras en la sta-
cidomon,

Portistoj portas la pakaj-
ojn,
nin en hotelon,

Oni enregistras niajn nom-
ojn.

kun eliroj al vasta koridoro,

Vastega korto per fenestr-
oj

ŝrankon, apgoseĝon, seĝojn,
noktblon, glason kaj botel-
on,

pendilojn, elektrajn lampojn,
ĉe la muro kaj ĉe la plafono.

e la teretaĝo estas manĝ-
ejo.

Ni vidas la kuirejon
benkojn, kaserolon, kestojn,

sakojn, barilojn pladojn, k. c.

Ni ŝercas pri l'estro de la
kuirejo.

kaj petante fervojbileton,
anoncante al ni la finon
kaj la vagonaro haltas.

kiujn metas sur aŭtomob-
ilon.
ĉe kies vestiblo, ĉe l'sojlo,

Ni supreniras ŝtuparon,

estas ĉambroj komfortaj,

aerumas koridorojn.

tualettblon kun ĝia kruĉo
bonan liton, kun molaj ma-
tracoj, kapkusenoj,

tapiŝon sur la planko,
Estas komforta hotelo,
muziksalono, fumejo k. c.

ĉe l'subteretaĝo
kaldronojn, kuirpotojn,

La fairejo kaj siaj

DEKUNUA LECIONO

Ni vizitas la urbon.

La kvartalo aristokrata enhavas belajn arĥitekturajn, ampleksajn kaj bonege pavimitajn stratojn.—Ĝi estas higiena modelo, kaj progresema urbo.—Ĝi posedas tramajn, telefonajn, telegrafajn, akvodisdonantajn kaj kloakajn retojn, tre bone aranĝitajn. Ni trovas ĉiujn signojn de l'civilizacio, palacojn, monumentojn, parkojn, promenejojn, ĝardenojn nuancitajn per diversaj kaj belaj floroj, kiel la rozoj, levkojoj, krizantemoj, diantoj, tulipoj, kamelioj, dalioj, geranioj, violoj, heliotropoj, ĥacintoj, jasmeno, siringo, lilioj, iridoj, narcisoj, lekantoj kaj belegaj kreskaĵoj kiel la palmoj, akacioj, poploj, ulmoj, k. c., kiuj balsamigas aeron; statuojn, muzeojn k. c.

Ne mankas komfortaj kluboj, teatroj, cirkoj, gastejoj; potencaj financaj firmoj kiel bankoj, ankaŭ borso; instruaj domoj, kiel lernejoj, institutoj, akademioj, universitato; kasernoj, temploj, gravaj industriejoj, fabrikoj, magazenoj, butikoj, bazaroj, apotekoj, hospitaloj, haloj, kampoj por ĉiuj sportoj, k. t. p.

Ĝi posedas belan marbordon, tre vastan havenon kun grandegaj havenmarŝejoj.

Ni rigardas fieran ŝtonan konstruaĵon kun fortaj kradoj, feraj pordoj kies seruroj kaj rigliloj estas fortegaj, ĝia aspekto estas terura, ĝi estas malliberejo!—Ni supreniras en monteton kie oni konstruas grandan konstruaĵon, artan palacon, kiu ŝajnas formikejo, pro la grandega nombro da laboristoj kiuj ĝin konstruas, masonistoj, ĉarpentistoj, meĥanikistoj, skulptistoj, pentristoj k. c., fervore laborante.

De tiu ĉi monteto oni rigardas belajn ĉirkaŭaĵojn, belajn vidaĵojn, kiuj plezurigas nin.—Ni revenas en la hotelon tre laŭcaj pro longa marŝado.—Ni mendas al la mastro senpagan enirbileton por viziti naturhistorian muzeon.—Ni vespermanĝas bone, ĉar ni havis grandan apetiton, ni malsatis.—Poste ni ĉiuj enlitigas.

DEKDUA LECIONO

Ni vizitas naturhistorian muzeon.

Matene je la oka ni leviĝas, ni nin lavas kaj finas vestiĝi.—Ni matenmanĝas, kaj tuj ni eliras.—Ni alvenas al la muzeo enirante en ĝin.

Multajn salonegojn ni vizitas, plenigitajn da bestoj, tie ni vidas simiojn, vespertojn, hundojn, katojn, ĥienojn, lutrojn, ursojn, lupojn, leonojn, tigrojn, fokojn, ratojn, musojn, kuniklojn, kastorojn, elefanton, mastodonon, hipopotamon, rinoceron, porkon, ĉevalon, azenon, zebbron, mulon, iujn sendentulojn, kanguruon, kamelon, dromedaron, lamon, moskon, kapreolon, ĝirafon, kapron, ŝafon, bovoviron, skeleton de baleno, delfenon, multegajn birdojn, kiel vulturojn, falkojn, aglon, akcipitron, nizon, milvon, strigojn, najtingalojn, hirundojn, kanariojn, paserojn, kokojn, kolombojn, perdrikojn, koturnojn, meleagrojn, eikoniojn, struton, pelikanon, anserojn, cignojn, anasojn; testudojn, krokodilojn, serpentojn, kolubrojn, viperojn, bufojn; fiŝojn, gadojn, skvalojn; moluskojn, ostrojn, mitelojn, helikojn, diversajn konkojn; multajn insektojn, kiel papiliojn, muŝojn, formikojn, grilon, pulon, kulon, pedikon, cimon, skarabon, araneojn, skorpiojn, tarantulojn; krustacojn, kiel krabojn, krankojn, ermikon; vermojn, kiel lumbrikojn, hirudojn, aliajn malsuperajn bestojn kiel soliterojn, trikenon; koralon, spongojn, kaj multajn, kies nomojn ni forgesis.

Ankaŭ estas aparta ĉambro por la homo, kies ĉambron ni vizitos vespere.

Ni iras en la hotelon por tagmanĝi.

DEKTRIA LECIONO

Ni daŭrigas la viziton.

Post tagmanĝi ni de nove iras en muzeon.—Ni vizitas ĉambron nur destinita por la homo.—Ni vidas kraniojn kaj skeletojn, kiuj apartenis al diversaj rasoj, kaj de la plej antikva homo ĝis la nuna homo. Per tiuj skeletoj oni povas studi ĉiujn ostojn, la trabaĵon de l'trunko formita per ripoj, esternono, spino kaj pelvo; brakojn kun ĝiaj humero, kubuto, ulno kaj radio; karmo aŭ manradiko, metakarmo aŭ mezmano, kaj fingroj; kruurojn kun ĝiaj femuro, genuo, fibulo, tibo, peroneo, piedo (tarso kaj metatarso), maleolo, kalkano, plando kaj fingroj.

Ankaŭ ni vidas, apud tiuj, artefaritan homan korpon, per kiu oni povas studi ĝin: kapon kun kranio kaj vizaĝo; ĉe la kranio cerbon, cerbeton, kaj encefalkolon; ĉe la vi-

zaĝo frunton, tempiojn, brovojn, okulojn kun ĝiaj palpebroj, okulharoj kaj pupiloj, vangojn, nazon, buŝon, lipojn, dentaron, langon, palaton, makzelojn, orelojn kaj mentonon, hararon, kiu kovras supran kaj postan parton de l'kapo, lipharojn, barbon k. e.; trunkon kun la kolo, gorgo, nuko, ŝultroj, akseloj, brusto, dorso, mamoj, ventro, umbiliko, koksoj, talio, ingvenoj, anuso kaj postvangoj; muskolojn, kiel tibikarnojn k. e.; felon kiun ni nomas haŭton; internaĵojn, kiel koron, pulmojn, renojn, hepaton, lienon, pankreazon, stomakon, intestojn, seksajn, organojn, sangon, arteriojn, kaj vejnojn.

Ni eliris tute miritaj, kaj ni iris promenante en la belan havenon. Tie ĉi ni trovas amikon, ŝipestron, kiu invitas nin viziti lian ŝipon.—Ni akompanas lin suprenirante en la ferdekon de lia bela, komforta kaj granda vaporŝipo.

DEKVARA LECIONO

Vizito de la ŝipo.

Ni supreniras en la unuan ferdekon, kaj ni miras, ĉar la ŝipo ŝajnas naĝanta urbo.—Tra ĉie amaso da maristoj kaj personoj okupitaj, freneze laborante.—Sur la ĉefa ferdeko estas aliaj tri ferdekoj, kiel granda trietaĝa domo, kun multego da ĉambroj, komfortaj kaj grandaj fumejoj kaj legejoj, muzika kaj dancsalonego, ankaŭ salonego por ĉiaj ludoj, kiel ludkartoj, bilardo, ŝako, kaj aliaj. Supre la ponto, pilotĉambreto, kaj tri kamentuboj. Ĉe la ĉefa ferdeko, ni rigardas pakajlevilojn, ŝnuregojn, grandajn ĉenarojn, kablojn, ŝnuraron, ankretojn, ŝipetojn, vaporŝipeton, kaj irante en la ĉielon kvar graciajn mastojn, kun iliaj vergoj, ŝnuraroj, veloj kaj ŝnurŝtuparoj, kaj ĉe kies pinktoj la vento movas longajn mallarĝflaĝetojn; ĉe la balustrado, ni vidas metitajn naĝilojn; ĉe la du flankoj de l'ŝipantaŭo du ankregojn; ĉe l'ŝipposto direktilon, kaj sin klinante eksteren el balustrado, tra la kvietaj akvo, du ŝraŭbegojn, kiuj movigas tiel grandan naĝantan urbon; ĉe la internaĵoj kelojn, komercaĵejojn, manĝajtenejojn, glaci-manĝajtenejojn por viandoj, maŝinĉambrojn, kiel inferon pro la varmo kaj bruo, kie estas maŝinistoj kaj hejtistoj, kiuj ŝajnas diabloj. Ankaŭ montris al ni la kapitano, starigitan senfadenan telegrafan stacion, kaj bone provizitan malsanulejon, kie povas flegi malsanulojn flegistoj kaj flegistinoj.—Ni interparolis kun la ŝipestro ĉe lia ĉambreto, kie li invitis nin trinki bieron, kaj li anoncis al ni, ke la ŝipo mareniris la sekvantan tagon, kaj vizitos apudan belan iusulon, kaj ke li ĝojus, li havus grandan plezuron, se ni akompanus lin, se ni farus tiel marekskurson. Ni akceptis kaj pretigis nin por tiu marekskurso, por ni tre agrabla.

Marekskurso.

La ŝipo finis ŝarĝi komercaĵojn.—La ŝipo tremegas.—La ŝraŭbegoj komencas turniĝi.—La malkvietiĝita akvo, kiel kolerita, ĉar la ŝraŭbegoj ateneis ĝian kvietecon, ĵetas en la ŝipon sian ŝaŭmon, kiel ofendon, ŝajnas ke la akvo kraĉas. Oni aŭdas la bruon de Pankromaŝinleviloj.—La ŝipantaŭaĵo fendas la maron, ni marŝas, kaj post ŝippostaĵo la ŝipo lasas ŝaŭman vojon. La ĉielo estas nuba, la nuboj estas grizaj kaj nigraj, fortega vento ekmoviĝas, la antaŭe trankvila akvo koleras, kaj altegaj ondoj sin rompas kontraŭ la flankoj kaj ŝipantaŭo de nia ŝipo, kiu kuraĝe antaŭeniras balanciĝante. Mirinda spektaklo, grandioza spektaklo, kvankam terura! Baldaŭ ni observas, ke mar-

istoj kaj kelkaj oficeiroj pretigas vaporŝipeton kaj iujn ŝipetojn. Kio okazas? Ĉu estas danĝero? Ĉiuj sin demandas. La ŝipo ŝanĝas sian direkton. Vaporŝipeto tuj funkcias kaj ĝi kaj ceteraj pretigitaj ŝipetoj estas jetitaj en la furiozan supraĵon. La ŝipestro ordonas de la ponto, kaj tiam ni divenas okazantaĵon: alia ŝipo riskas fundiri, kaj ĝia ŝipanaro droni, pere; ni jam vidas ĝin. Ĉu estas ĝi fregato, korveto aŭ jaĥto?—La mastoj krakas pro l'eklono.—La ŝipetoj, kiuj iras savi la maristaron de l'malfeliĉa velŝipo, remas kuraĝe kaj senlace, ni vidas ilin supreniri kaj malsupreniri akvomontegoj, aperi kaj malaperi, ni ankaŭ alproksimiĝas al malbonsorta velŝipo, kaj ni klare vidas kuri ĉe malfeliĉan ŝipanaron, iuj preskaŭ nudaj sin jetas en la maron kaj naĝante alvenas al savantaj ŝipetoj, aliaj, per jetitaj ŝnuroj, enŝipetiĝas, kaj poste savintoj kaj savitoj venas al ni.—Ni entuziasme aplaŭdas, ni gratulas savintojn, kaj konsolas savitojn, kiuj motras kruelajn kaj terurajn signojn de grandegaj klopodoj dum terura batalado kontraŭ la morto, tamen ilia sorto ne volis kondamni ilin pere kun ilia ŝipo, kiu antaŭ ni fundiris. Multaj el la savitoj estas febraj kaj preskaŭ nudaj, kaj ĉiuj devas ŝanĝi siajn vestarojn, tute trempitaj de l'akvo, kaj decas flegi ilin. La vojaĝantaro provizas ilin per kamizoloj, ĉemizoj, kalzonoj, veŝtoj, jakoj, pantalonoj, ĉapeloj, ĉapetoj, peltoj, ŝtrumpetoj, botoj, kaj ŝuoj, ankaŭ disdonas monon al ili. Inter la savitoj estas du infaninetoj, fratinetoj, filinoj de l'ŝipestro, kaj nevinoj de l'subŝipestro, kiu estas bofrato de l'ŝipestro, kiujn karesis, kisis kaj zorgis la vojaĝantinoj, kiuj baraktis sin reciproke, ĉar ĉiuj volis esti la unuaj zorgi ilin, kaj donaci al du fratinetoj jupetojn, kiletojn, subjupojn, ŝtrumpojn, korsetojn, ŝalojn, robojn, orelingojn, broĉojn, koliaĵojn, medalojn, medalionojn, k. c. La ŝipestro diris al ni ke la savita ŝipanaro konsistas el preskaŭ familio, ĉar la piloto estas kuzo de l'savitaj fratinetoj, kaj tial la ŝipestro kaj subŝipestro estas liaj onkloj; la maljuna subpiloto, lerta marlupo, ju pli postulema, des pli bonkora, amegas siajn nevojn, la du submaristojn, knabetojn dekjaran kaj dekdujaran, ĉar oni diras, ke la avoj amas nepojn pli, ol patroj amas filojn; la ceteraj maristoj estas parencoj pli aŭ malpli proksimaj, kaj ĉiuj kunmarbordvilaĝanoj. La ŝipo kaj komercaĵoj estis asekuritaj. Kiel ĉiam, post la marfuriozezo alvenas markvieteco, kaj ni daŭrigas nian marvojaĝon ne suferante marmalsanon, enirante fine en insulhavenon, kio elŝipiĝas kontentaj geŝippereuloj. Ni vizitas la insulon, kaj ensipiĝas de nove revenante hejmen.

AL LA AŬTORO

Jen mia opinio pri via verketo:

Tiu ĉi lernolibro estas tre interesa kaj utila ĉar per ĝi la aŭtoro atingos tion kion oni devos peni atingi per lernolibro; tio estas, lernigi facile kaj rapide. Multaj aŭtoroj supozas ke por lernigi sufiĉas prezenti skribe la lernigotajn aferojn. Tio estas tre facile por la verkisto, sed ne por la lernantoj; kaj oni devas celi la profiton de la lernanto ĉar la instruisto estas kiu faras la servon, kaj la lernanto estas kiu ĝin ricevas. Pri tio okazas tute same kiel pri la regado de nacioj; la registaro estas la servantaro, kaj la popolo, la nacio, estas la mastro kiu pagas kaj ricevas la servon. Sed ĝis nun nur malmultaj komprenis tion, kaj ankoraŭ kelkaj registaroj regas per manieroj tre oportunaj kaj facilaj por ĝi, sed nek agrablaj nek dezirindaj por la regataj popoloj; kaj ankoraŭ kelkaj instruistoj instruas senklopode sed klopodigante siajn malfeliĉajn lernantojn.

Tiu ĉi lernolibro samtempe instruas kaj amuzas. Diversajn farojn, okazintaĵojn kaj aventurojn ĝi aperigas antaŭ la lernanto, kiu ne bezonas klopodi por teni la libron en la mano antaŭ la okuloj. Kontraŭe, volonte kaj ame li tralegos kaj relegos ĝin. Samtempe la lernanto ricevos sciigojn pri sciencoj, kaj tiujn sciigojn kiujn oni lernis, lernante vortojn, oni malfacile forgesas. Per tiu ĉi lernolibro, relative malgranda, oni povas lerni multegon da vortoj kaj frazoj, kaj plej utilaj kaj necesaj.

Resume; ĝi ne estas unu el multaj ordinaraj lernolibroj, sed, laŭ mia opinio, unu el la plej bonaj kaj rekomendindaj.

Rafael de San Millan.

“HOMARO”

ESPERANTA ĈIUMONATA REVUO

Jara abonprezo: Sm. 1 — por ĉiuj landoj.

Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista.

Oni akceptas respondkuponojn.

HOMARO eldonos interesigajn broŝurojn, kiujn ĝi sendos senpage al la abonantoj. Mendu tuj *La deveno de Homo'n*, scienca interesiga broŝuro, kiu enhavos multajn bildojn kies prezo estas 0 Sm. 400 s. (kvar respondkuponojn).

Vi povos mendi ankaŭ *Tri rakontoj kaj kelkaj versaĵoj'n* originale kaj esperante verkitaj de D-ro Rafael de San Millan, kies prezo estas *Unu respondkuponon*.

ADRESO:

*J. M. Rosenörņ - Pasaje del Comercio, 8.
Madrid-España (Hispanujo).*